


# BULTENO

DE ESPERANTISTA KLUBO ĈE  
OSVĚTOVÁ BESEDA EN PRAHA 2.



No 4.

Junio 1953

Aperas laŭbezone

Moto: "Ni semas kaj semas,  
neniam laciĝas ..."

Tre estimataj!

El ĉiuj mondpartoj venas komunikoj, laŭ kiuj oni povas konstati, ke la internacia lingva demando ree insiste aperis en la tagordo. Multiĝas enketoj por esplori publikan opinion pri la plej konvena solvo de la problemo. Oni proponas elekton de praktika d u a lingvo por tiu aŭ alia sfero; fine oni devas ankaŭ serioze trakti la eblon enkonduki u n u s o l a n LINGVON INTERNACIAN.

Estas interese, ke en pluraj landoj atingis Esperanto en la demandaroj tre altan nombron da poentoj, en la plej proksima Nederlando ekz. 30%.

El tiuj faktoj rezultiĝas, ke eĉ la ĝenerala publiko, ne tuŝita de propagando kaj informoj kaj ne konanta la rezultojn de niaj 60-jaraj klopodoj, konscias bezonon de neŭtrala lingvo, kiu ne havante celon elpuŝi iun ajn el la lingvoj naciaj, prezentus relative facilan rimedon por reciproka interkomprenado.

Ĉion ĉi sperta Esperantisto konscias afero memkomprenebla! Sed gravas ankoraŭ alia punkto: Havante la rajton - laŭ sia konvinko - deklari Esperanton plej bona solvo de la menciita problemo, ĉiu Esperantisto konsciigu ankaŭ la devon s u b t e n i organizon, kiu reprezentas lian propran konvinkon antaŭ la publiko! Nia klubo, kiu fieras pri tradicio plej frua, tenas la standardon alte malgraŭ ĉiaspecaj malhelpoj. Ĝuste en la lasta tempo ni sukcesis prezenti al niaj membroj valorajn programojn, kiuj altiris eĉ publikon neesperantistan; ne luksa eksteraĵo, sed kvalito de la enhavo gvidas nin.

Tiel ni pruvas, ke Esperanto estas grava fenomeno kultura kaj socia, kiun oni devas trakti ne nur laŭ vidpunkto lingvosciencia!

Ni vokas vin: p a r t o p r e n u n i a j n k u n v e n o j n ,  
h e l p u n i n e n l a l a b o r o , k o n t r i b u u l a ŭ v i a  
p o v o ! Ĝuste nun gravas via persona ĉeesto; en viglo de nia membraro vivu la lingvo. Nia parolo estu:

KVANTO KAJ KVALITO -  
ROKO EL GRANITO !

ŝt.U.



## LETNÍ KOLEJ ESPERANTA V DOKSECH.

LKED uspořádá spolu s esperantským kroužkem závodního klubu ROH-AZNP v Mladé Boleslavi z technických důvodů letos své kursy na hradě K o s t i v Českém ráji od 5. do 15. srpna 1953.

Počet účastníků je omezen na 60. Ubytování v hotelu, v soukromí nebo ve společné noclehárně. Možnost koupání v místě.

Kursy pro začátečníky podle Če-metody, pro pokročilé (konveršačně-řečnické) a esperantský seminář s odbornými přednáškami.

Celodenní výlet napříč Českým rájem.

Bližší informace žádejte na adr.: K. Šolc, Mladá Boleslav III., Janáčkova 566.

-. -

### A t e n t u !

Alvenas ĉiam ankoraŭ multaj leteroj, adresataj al Esperanto-Asocio en ĈSR, kiu ne plu ekzistas. La leteroj estas transdonataj al la Esp. klubo en Praha kaj ĝi klopodas ilin laŭ sia ebleco respondi. Ĝi faras tion kun plezuro, sed oni bonvolu kompreni, ke ĉiuj funkciuloj estas ekstreme okupitaj kaj tial la respondoj ne estas iam donataj tuj.

Adresu ĉion al la prez. de EK Praha s-o Jaroslav Šustr, Dlouhá 10, Praha I. kaj ne forgesu aldonmeti respondan afrankon!

-. -

Ĉeĥa literaturo en japana lingvo - per Esperanto.

Sub titolo "Sekai Kaiho Ŝisu" kaj kun esperantlingva subtitolo "Monda liberiga poemaro" aperis pasintjare en Tokio poemkolekto de progresemaj poetoj el la tuta mondo. En ĝi estas represitaj en japana traduko la poemo "Ostrava" de Petr Bezruč, "Nia kanto" de Stanislav K. Neuman, "Epitafo" de Bohuslav Bárta kaj fragmento el "Balado" de Jiří Wolker.

Ĉiuj tradukoj estis faritaj laŭ esperantlingva teksto, la unuajn tri faris Tugu Kurisu, la lastan Micuharu Kaneko. Same kiel antaŭ jaroj la japana samideano Aitaro Jamanoi, nun s-o Kurisu faras multe da utila laboro por konatigo de ĉeĥa literaturo en Japanio. Japana traduko de "Muta barikado" laŭ Esperanto-traduko de Imrich Zálupský kaj Miloš Lukáš estas ankaŭ lia laboro.

-. -

Ni deziras havi lingvon komunan por ĉiuj homoj de la mondo por ke ni kunvivu pace sur la pli kaj pli malvastiĝanta terglobo. Estus oportune, se ĉiuj homoj lernus Esperanton krom sia gepatra lingvo. Bedaŭrinde, Esperanto ankoraŭ ne estas disvastigita tiel bone kaj oni laŭ bezono lernas diversajn provizorajn internaciajn lingvojn. Estas tragedie, ke ekzemple la sendependigitaj Hindoj uzas anglan lingvon iam pli malpli devige altruditan de la subpremantoj. Tia tragedio faras baron al venigo de vera paco. Por eviti tian tragedion ni deziras, ke ĉiuj nacioj de la mondo apliku veran internacian lingvon kiel Esperanto. Se tio estas tro malfrua, ni tamen ne povas forĵeti la revon, ĉar mi kredas, ke la mondpaco, kiu devas stari sur ĝusta kompreno kaj amo inter la popoloj neniam realiĝos, ĝis ĉi tiu revo efektiviĝos!

El la parolado de la dekano de jura fakultato  
de universitato en Tokio prof. Mijazava en radio Tokio.

-. -